


---

---

# LA DEKSEPA



Bulletin Mensuel Espérantiste  
servi gratuitement aux membres de la Section du XVII<sup>e</sup> Arr<sup>t</sup>  
du Groupe Espérantiste de Paris.

---

---

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : H. de COPPET  
179, Boulevard Pereire, Paris.

---

ABONNEMENT : 1 franc par an. — Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :

Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

---

---

## Groupe Espérantiste de Paris - Section du XVII<sup>e</sup> Arrondissement

---

Réunions amicales tous les Mercredis soirs, à 9 heures,  
Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière.  
Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

---

### Notre Dîner mensuel.

Les prochains Diners mensuels de la Section auront lieu  
les Mercredis 7 Février et 6 Mars 1912, à 8 heures précises  
du soir, Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris.

Prix : fr. 3,25 (boisson et pourboire compris).

---

### Prochaines causeries.

- 7 Février. — Dîner mensuel suivi de jeux espérantistes.
- 14 Février. — Nederlando (lumbildoj), S-ro H. van Etten.
- 21 Février. — Literatura festo, S-ro Devjatnin.
- 28 Février. — Macedonilando (lumbildoj), S-ro J. Kobouroff.
- 6 Mars. — Dîner mensuel suivi de jeux espérantistes.

Le Secrétaire : ROBERT BOLLACK.

## INFORMATIONS

Le **Touring-Club de France**, désirant témoigner sa sympathie à notre cause, vient de prendre 20 abonnements à la « Dek-Sepa », qui seront distribués par ses soins dans un but de propagande. Nous sommes extrêmement touchés de cette marque de confiance, et nous avons adressé au Président du Touring-Club de France l'expression de nos vifs sentiments de gratitude.

**Avis important.** — Les membres de la Section du 17<sup>e</sup> Arrondissement qui n'ont pas encore acquitté le montant de leur cotisation pour 1912, sont instamment priés de vouloir bien en envoyer le montant (Fr. 3,—) en mandat ou en timbres-poste, à notre trésorier, M. Daniel, 14, rue Bayen, **avant le 29 Février.**

Passé cette date, le recouvrement sera fait par la poste dans les premiers jours du mois de Mars, augmenté des frais de recouvrement (en tout Fr. 3,50).

Prière à tous nos membres de vouloir bien laisser des instructions chez eux pour que ces cotisations soient versées entre les mains du facteur. Tous nos remerciements à l'avance.

**Arta Vespero** okazos Mardon la 27. de Februaro, je la 9-a, en la salono de « Verda Stelo », 129, rue Marcadet (Métro : Marcadet).

S-ro Victor Polgar parolos pri « Nia Himno », kiu parolado estos akompanata de kantoj de niaj plej ŝatataj esperantistaj kantistoj, S-roj H. de Coppet, Georges Grosset kaj Em. Robert.

Poste oni prezentos komedieton de S-ro V. N. Devjatnin, « La instruita Mimikisto », ludatan de la aŭtoro kaj de S-roj Dubois kaj Couteau.

Ni esperas, ke multaj « Dek-Sep »-anoj profitos tiun okazon, kiu ebligos al ili agrable pasigi kelkajn horojn en amika rondo.

**Imitinda ekzemplo.** — En la « Bon Marché », konata firmo pariza, ni rimarkis, okaze de l'novjaraj donacoj, meze de la granda centra halo ĉiunaciajn flagetojn, kaj, inter ili, blankan ŝtofon kun verda stelo.

La flago esperantista flirtadis do dum pli ol unu monato en ĉefa pariza magazeno.

Gratulon kaj dankon al la administrantoj de la « Bon Marché ».

**Fête de propagande à Creil.** — Une fête de propagande aura lieu à Creil le 3 Mars prochain. Comme tous les détails n'en sont pas encore arrêtés et comme il sera trop tard pour en parler dans le numéro de Mars, la Rédaction de la « Dek-Sepa » prie tous nos amis que la chose intéresse de s'adresser à M. Robert Bollack, 95, Avenue Victor-Hugo, à Paris, ou à M. Maurice Michon, 2, rue du Parc, à Creil (Oise).



## LA MONATO ESPERANTISTA

---

Tiu ĉi foje, la monato esperantista estos mallonga, ĉar depost la Kongreso de Antverpeno, ne okazis multe da interesaj aferoj. Tamen, se mi devas fidi je kelkaj gazetoj francaj kaj esperantaj (Paris-Esperanto, L'Auto, Le Journal), S-roj Michelin donacis 20.000 frankojn por Esperanto, tio estas tute atentinda fakto; sed ĉar oni ne ankoraŭ bone konas la kondiĉojn de l'donaco, mi forlasos tiun punkton ĝis proksima monato.

Alia tre interesa fakto estas la paroladvojaĝo de S-ro Ed. Privat tra Franclando kaj Itallando, kaj kiu estis akceptita de la reĝo mem, Viktoro-Emanuelo III-a, kiu legis parton el libro esperanta kaj kiu certigis nian samideanon pri lia granda interesiĝo al nia movado. S-ro Privat jam vizitis Lyon, St-Etienne, Annonay, Vienne, Genova, Firenze, Roma, Bologna (« Esperanto », Decembro 1911) k. t. p.

En Egiptlando, fondiĝis « Egipta Esperantista Asocio », kiu intencas energie propagandi nian lingvon en Nord-Afriko. (« The British Esperantist », Decembro 1911).

Novaj grupoj fondiĝis en Fürth, Peterburgo, Dorpat, Spa, en insulo Madeira, Szerencs (« Esperanto », Dec. 1911).

Mi ĝojas anonci, ke la gazeto « Germana Esperantisto » nun aperas dufoje ĉiumonate, kaj ke « Germana Esperanto-Gazeto » ĉiusemajne.

Esperanto estas nun lernata en multaj anglaj lernejoj, inter aliaj, la fama « Clark's College » London kaj en « County School » Harrow (« The British Esperantist », Dec. 1911).

En Paris, estis fondita nova societo por la propagando de Esperanto per diversaj artoj prezentitaj publike sur sceno, sub nomo de « Zamenhofa Artista Adeptaro ».

Ankaŭ dum la ekspozicio aeronautika ĉe « Le Grand Palais » estis vendejo de esperantaĵoj, kiu faris multe da bonega propagando. Ĉiutage vendiĝis 150-200 ruĝaj broŝuroj!! kaj tio dum tri semajnoj!!!

Nia literaturo riĉiĝis de nova *originale* verkita libro « Paŭlo Debenham » 220-paĝa, de S-ro Luyken.

Fine, kiel lastan jaron, la firmo Cook aranĝis vintran sezonon por esperantistoj en St-Cergues (Svislando). (« The British Esperantist », Dec. 1911).

Mi do finos mian raporton per jena eltrancitaĵo el «Lingvo Internacia», sub titolo *Unueco* (Th. Cart):

«... Esperantisto, diras la Bulonja Deklaracio, estas nomita ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo esperantista, por ĉiu Esperantisto estas rekomendinda sed ne deviga. Tiu difino respondas du demandojn. Efektive rezultas el ĝi: 1-e, ke, se la unueco estas deviga sur la lingva kampo, kie ĝi estas nepre necesa, nur sur la lingva kampo ĝi estas deviga; 2-e, ke, ĉar la apartenado al ia societo estas nur rekomendinda, organiza unueco, eĉ se ĝi estas utila en diversaj cirkonstancoj (kaj pri tiu neniu dubas), ne estas deviga.»

*H. van Etten.*



## NOVJARA SALUTO

(1912).

Laŭ la nova kalendaro  
Ĝam alvenis nova jaro,  
Kaj kun ĝi al la homaro  
Venis, kvazaŭ ŝip' el maro,  
Zamenhofa Adeptaro.

En ĉi tiu ĝoja horo  
Mi de l'tuta mia koro  
Levas, laŭ antikva moro,  
La pokalon pro la gloro  
De l'amika nia horo!

For, la glavo militanta,  
Ĉiam sangon soifanta!  
For, malpacon predikanta  
Idistaro aroganta!  
Vivu paco nun konstanta!  
Vivu mondo Esperanta!

V. N. DEVJATNIN



## INTER NI

---

Internacia Sekcio ! Lastatempe nin vizitis F-inoj Perth (Aŭstrino), Clark (Anglino), S-ino Schæffer (Germanino), S-roj Devjatnin (Ruso), Caballero (Hispano), Fassetta (Italo), Flügel (Anglo), Wynschenk (Nederlandano), Korinek (Ĉeĥo), Kobouroff (Macedoniano). Sufiĉe bone, ĉu ne ?



Ĉe la lasta vespermanĝo, post la « Galette des Rois », fariĝis reĝoj S-roj de Coppet kaj van Etten, kiuj elektis kiel reĝinojn F-inojn Ballet kaj Talvat. Miajn gratulojn !



Post tiu festeno, la « Vojo » kaj la « Espero » estis kantitaj majstre de nia prezidanto.... en fonografo ! Esperantaj cilindroj ! Jen maloftaĵo !



Nia ĉarma, juna samideanino F-ino Jeanne Després, faris antaŭ nelonge sian unuan publikparoladon, kun plena sukceso. Daŭrigu, Fraŭlino !!

Fuŝisto.



## Zamenhofa Artista Adeptaro.

---

Jus fondiĝis en Paris societo, kies celoj estas :

1. Propagandi Esperanton per diversaj artoj, prezentotaj publike ;
2. Doni al la geesperantistoj la eblecon, dum la horoj de ripozo agrable kaj utile amuziĝi, aŭdante sian, tiel diri, duan patran lingvon, prezentatan en teatra ludado, muziko, k. t. p. ;
3. Ekzercadi en partoprenantaj amatoroj bonan artistan guston, disvolvadi en ili la naturan, iafoje kaŝitan talenton, kaj alkitimigadi ilin ludi, muziki, kanti, deklami kaj paroli publike ;
4. Arangi enlandajn kaj eksterlandajn artistajn vojaĝojn, por montri en aliaj esperantigataj urboj la belecon de nia kara lingvo, kaj tiamaniere akceli ĝian ĉiulokan disvastigadon ;

5. Partopreni en teatraj prezentadoj kaj koncertoj dum la estontaj Kongresoj internaciaj.

Certe ĉiuj Esperantistoj tuj komprenos la utilecon de tiuspeca societo, kaj la bonon, kiun ĝi alportos al Esperanto mem. Tiu nove naskiĝinta « Adeptaro » deklaris kiel ĉefajn punktojn : Nerompeblan fidelecon al Fundamento de Esperanto kaj konstantan uzon de la lingvo Esperanto dum la kunvenoj kaj prezentadoj, preskaŭ ĉiuj membroj estantaj diversnaciuloj.

Jam pli ol 40 personoj reprezentantaj 12 naciojn aliĝis al la « Z. A. A. ».

Laŭ la regularo ĵus alprenita, la jara kotizaĵo estas fiksita je 1 Sm. (2 fr. 50).

La ripetadoj-kunvenoj okazas ĉiumarde ĉe la Brasserie-Restaurant de Valois, Palais-Royal, je la 9-a vespere.

Aliĝu do, karaj « Dek-Sep »'uloj kaj vivigu la « Zamenhofa Artista Adeptaro »'n, kiu ĉiam penos esti inda je vi.

H. VAN ETTEN

sekretario.

---

## Pola Rakonto.

---

Nia kunsekciano S-ro JOHANO DE LUCZENBACHER aperigis lastan jaron ĉe la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris, verkon titolitan « Du Noveloj el Maŭro Jókai », la plej glora hungara verkisto. Ni ne povas ne cedi al la deziro konigi al la gelegantoj de la « Dek-Sepa » eltiraĵon el tiu rimarkinda traduko, kiu certe incitos multajn el ili aĉeti la verkon.

N. d. l. R.

.....

« Mi do fine estis ĉe la celo. Ni vojaĝis sur la sama vagonaro, mi kaj li, kiun mi serĉis de tiel longe.

Mi vidis lin persone. Je unu stacio li eliris el la vagono tiam mi atentis, kioma estas de mi la vagonaro, en kiu li veturas.

Mi kalkulis, kioma estas la fenestro, per kiu li etendis la kapon, por ke li adiaŭu unu el siaj oficirkolegoj. Mi sentis la pulsfrapon de ĉiu guto de mia sango, de l'kapo ĝis la fingropintoj.

Tie mi staris antaŭ la ago.



Estis tage kaj mi ne povis atendi ĝis la nokto. Unue por ke oni ne forportu min malproksimen de Varsovio ; sed ankoraŭ pro la timo, ke li dumvoje povas eliri, vojaĝi en alian direkton, kaj mi tiam forrestus de li.

Heltaglume mi devis plenumi mian teruran projekton. Nun, kiam mi repensas pri ĝi, mia sango kvazaŭ frostas, rememorante tiujn terurajn minutojn.

La ideo de mortigo estas abomeninda.

Naŭza, animmakuliga penso ! Kaj mi juris, ke mi plenumos ĝin, kaj dum longaj monatoj mi ne faris alion, ol projektojn pri tio, kiel kaj kiam.

Mi ĉion bone antaŭripensis.

Nur unu aferon mi forgesis. Tion, ke en la momento de l'plenumo mi ankaŭ estas homo.

Mi kredis, ke tio ne estas alio ol duelo, ol batalo ; mi konas tion sufiĉe ; ĉi tie malvarmsango, ĉi tie varmega decidemo gvidas la animojn ; ho, sed tio estas tute alia, mortigi homon, sen ke oni diru : atentu, mi staras antaŭ vi, defendu vin. Kaŝe alproksimiĝi, kiam li ne povas vidi min, nur mi vidas lin, kaj direkti la pistolon al lia koro, de unupaŝa distanco, apartigate nur per vitro, kiam li eble dormas, — kaj poste... forkuri post la ago. Tiun metion oni neniam lernigis al mi.

Sed io elpelis poste ĉian tremon el mia koro.

En la najbara kupeo sidis ĉasistoj, ili komencis kanti morkanton, kiu kiom da sango, tiom da koto jetas sur la Polojn. Tiu kanto ekbruligis denove mian sangon ; kiu penso antaŭ minuto glaciigis en mi la sangon, tiu nun ekbruligis en mi ĉion ; ĝi donis animforton al la terura ago.

---

**S**E VI SUFERAS pri la STOMAKO aŭ la INTESTOJ, ne hezitu unu minuton provi la

## MAYA BULGARE

Bulgara Lakta Kazeajo, kaj vi neniam plu sufros.

Informoj estas riceveblaj de la Societo

**Maya Bulgare, 332, rue St-Honoré, Paris**

TÉLÉPHONE 214-40.

Homo ĉirkaŭita de armitaj personoj, vojaĝis kune kun mi; la samaj armitoj ĉirkaŭas ankaŭ min, kaj tiun homon tamen nenio savas de morto, en brila horo de l'tago, kiam mi volas fari tion.

Mi sciis, ke post mallonge sekvas longa tunelo. Meze de l'hela tago, parto de nokto.

La vojaĝantoj interese elmetas la kapojn tra la fenestro por ĉirkaŭrigardi ankoraŭ unufoje en la valo, kiu ankoraŭ montras kverkarojn, deklivajn montegojn striatajn per verdaj semejoj, panoramon kolorigitan per serpentumantaj arĝentaj riveroj, kiun post kvarminuta mallumo, alia panorambildo anstataŭos: malhelaj abiarboj, torenta montrivereto, vojoj hakitaj en la ŝtonegon; ruinoj de antikvaj kavalirkasteloj.

Unu el ni, kiu scias, kian pejzaĝon ekvidos poste!

La leviganta eho antaŭanoncis, ke ni alproksimiĝas al la faŭko de l'tunelo.

Tiam mi senbrue malfermis la pordon de la vagono. Pro mia profunde dormanta kunulo, mi povis fari ion ajn. Kiam post unu minuto ĉio mallumiĝis ĉirkaŭ ni, mi subite ekmalfermis tute la pordon, kaj eliris sur la ŝtupeton de l'vagono. El la disrompita melono mi elprenis la pistolon kaj miajn skribaĵojn.

Sur la novmodaj vagonoj oni povas ĉirkaŭiri la tutan vagonaron, sen tio, ke la vojaĝantoj ĝin rimarku.

Rapide mi iris antaŭen.

Mi devis kalkuli la fenestrojn, kiuj estis de mia sidejo ĝis la loko de mia viktimo.

Tiu subtera nokto tute taŭgis por tia diabla atenco. Ĉirkaŭe infera mallumo kaj meze en tiu mallumego alimonda aŭdigas la krakegado, blovado, siblego de homfarita, infera

---

---

## LA VERA TIZANO DE L' PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝ-atakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60)

==== Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato. ====

Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al  
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.



monstro, kio ĉion surdigas. Kiu aŭdus tiam malfortan pistolpafon, finkrion de mortigato?

Fine mi staris antaŭ la elkalkulita fenestro. Ĝis tie ne niu min rimarkis.

En la kupeo sidis du; ilian formon mi ne povis vidi, nur du ruĝaj steloj, du fajrokuloj de cigaroj rigardis min el la mallumo.

Kiu estas el la du, kiun mi serĉas? Ĉu mi ne trafos tiun, kiu nenion pekis kontraŭ mi, kies juna vivo promesas tiom da espero? kiu povas ankoraŭ iĝi heroo, povas esti martiro de pli glora epoko!

Tiu dubo retimigis min. Mia brako, kvazaŭ el plumbo, malsuprenfalis. Senmove mi rigardis la du brulantajn sango-stelojn, kiuj donis du nesolveblajn enigmojn al mi.

Eble estus pli bone, se mi jetus min inter la rulantajn radojn. Tiam la pli proksime sidanta persono defrapis la grandigintan cindron de l' cigaro, kaj faris grandan fumtiron el ĝi.

La incitita fajrolumo brilegis lian vizaĝon, kaj mi ekonis lin en tiu ruĝlumo. Estis li. Tiu fajra lumo sur lia fiera vizaĝo revokis la diablon de mia venĝo.

La fenestro estis malsuprenlasita. Li blovis la fumon tute en mian vizaĝon. Tute same, kiel kiam mi demandis lin: en kia malsano mortis mia edzino?

Tio estis lia morto.

Mi sciis pri li, ke, sub la vestoj, li portas kirasĉemizon, li timas la kaŝajn mortigintojn. Mi do ne serĉis lin ĉirkaŭ la koro.

Je manlarĝo super la brulanta cigaro mi celis. Nur mallonga ekbrilo vidiĝis. La pafkrakon englutis la eĝeganta bruo de l' vapormaŝino.

En la alia momento, kiel mi jam antaŭe pensis, mi desaltis en la antaŭan direkton, en eta angulo de sur la ŝtupo de l' vagono.

☆☆

KONTRAŬ  
**MAR-**  
**MAL-**  
**SANO**

**DELPHININE**

De l' DOKTORO FLASSCHEN.

KONTRAŬ  
**FERVOJ-**  
**MAL-**  
**SANETO**

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan Premion** ĉe la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : 10 fr. (4 S).

Aĉetebla ĉe S-ro **WEITZ**, 8, Rue de Duras, Paris  
kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.

Mi falis, sed nenia malbono okazis al mi. Iom mi svenis, sed ne venis inter la radojn. La pezaj kaj feraj veturiloj en manstreĉa proksimeco preterrulis ĉe mi unu post la alia.

La tondrado, krakado foriris, ankoraŭ kelkajn minutojn estis aŭdebla la brulado de l'foriranta vagonaro, sub kiu tremis la tero. Mi ĉiam ankoraŭ kuŝis sur la tero.

Kiam ankaŭ tiu bruo foriĝis, mi ekaŭdis ian ĝemeton; kvazaŭ iu kolektas siajn lastajn fortojn por krii je helpo.

« Mortiganto! Mortiganto! » diris la ĝema voĉo en la mallumo.

La vagonaro jam longe foriris, kaj la mortanta voĉo ĉiam aŭdiĝis! Timtreme mi eksaltis, kaj komencis kuri al la faŭko de l'tunelo.

« Mortiganto! Mortiganto! » postkriis post mi la voĉo de l'nevidebla persono, dume mi, en tiu senluma malhelo, kiel frenezulo kuregis, kaj kiam mi, atinginte la benitan taglumon, ekstaris por ripozi de mia teruro, ankaŭ tiam postĝemis el la subtera mallumo la persekuta voĉo: « Mortiganto! Mortiganto! »

Poste, kvietsange pripensante, mi povis klarigi al mi la kaŭzon de l' teruraĵo.

Post la pafado, la kunvojaĝanto de l'mortigito, verŝajne lia adjudanto, postkuris post mi por persekuti min. Sed li ne tiel bone studis la teorion de l'salto, kaj frakasis sin. Li povis kriadi post mi. La vagonaro poste pluen kuris, kaj neniueksciis el la kunevojaĝantoj, ke du el ili mankas kaj unu estas mortigita. Tion ili eksciis, kredeble nur ĉe la sekvanta stacio, kiam mi jam estis, verŝajne, tre malproksime for de ĉio.

Kaj nun vi konas min. Mi estas via edzo, sed kiam ajn vi volos, vi povos eksedziĝi de mi.

Mi mortigis mian malamikon: sed tiam mi faris bonon al li, al mi malbonon, ĉar miajn proprajn songojn mi donis por ĉiam al li.

Li dormas senfine, kaj mi neniam. Pripensu, kia sorto estas, esti la kunulino de homo, kiu neniam povas fermi la okulojn. La ĉielo gardu la manon de ĉiu sentanta homo de tia sango, kiu estas nedelavebla! »

Lia edzino dufoje timtremiĝis kaj triafoje... ŝi klinis la kapon sur la sultron de sia edzo.

*Johano de Luczenbacher.*

---

Estas mallernita por la jaro 1912 abono al la gazeto

# La Ondo de Esperanto

(laŭ la adreso : 26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo).

Dum la 4-a jaro de sia regula funkciado « La Ondo » SENPAGE donos al siaj abonantoj, krom 12 numeroj (16-20-paĝaj) la speciale por tiu celo tradukitan de S-ino M. Ŝidlovskaja ĉefverkon de rusa literaturo

« **Princo Serebrjanij** » de **A. TOLSTOJ**.

(352-paĝa, grandformata libreĝo, kies prezo por la neabonantoj estos afrankite Sm. 1,60).

Literaturaj konkursoj kun monpremioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako. Korespondo tutmonda (poŝtk. ilustr.).

La abonpagon (2 rubl. = 2,120 Sm.) oni sendu al « Librejo Esperanto », (26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo) aŭ al aliaj Esper. librejoj, poŝtmandate, respondkupone, papermone aŭ per bankĉekoj.

---

## Germana Esperantisto

*Duonmonata gazeto por la disvastigado de Esperanto.*

La gazeto aperas en du eldonoj, kiuj duonmonate alternas.

**Eldono A**, eliranta la 5-an de ĉiu monato, celas la propagandon por Esperanto. Ĝi enhavas tiurilatajn artikolojn en germana kaj esperanta lingvoj kaj kronikojn pri la germana kaj internacia Esperanto-movado.

**Eldono B**, eliranta la 20-an de ĉiu monato, estas pure literatura. Ĝia enhavo konsistas el pli-malpli facilaj legaĵoj kiel eble plej bonstilaj, ekzercoj kun apuda germana teksto, por komencantoj kaj progresintoj; bibliografio, konkursoj, praktikaj konsiloj, enigma parto, k. t. p.

Jara abonprezo por Germanujo kaj Aŭstrio-Hungarujo 4 M. (2 Sm.), por ĉiuj aliaj landoj 2,250 Sm.

La abonoj nur komenciĝas en Januaro, Aprilo, Julio kaj Oktobro.

Laŭdezire oni povas aparte aboni ĉiun el ambaŭ tute sendependaj eldonoj por la duono de la supre montritaj prezoj.

**Esperanto Verlag Möller & Borel**

BERLIN SW. 68, Lindenstr. 18-19.

---

# DANUBO

Organo de la rumana kaj bulgara esperantistoj

Internacia monata gazeto (32 p., 16×24), nur en Esperanto.

Redaktata de speciala komitato, kun la kunlaborado de eminentaj diverslandaj esperantistoj.

ENHAVAS: abundan kvanton da plej internacia kaj zorge elektata Literatura; interesajn « Mikeaĵoj »; multipaĝan rubrikon « Krestomatio por Infanoj kaj Komencantoj »; artikolojn pri Esperanto, Esperantismo, Arto, Scienco, k. a.; zorge redaktatan « Esperantista Movado »; konstantajn rubrikojn « Diversaĵoj », « Bibliografio », k. t. p., k. t. p.

**Enhavoriĉa. — Fundamenta stilo.**

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO :

5, Str. I. C. Bratianu, BUCURESTI (Rumanujo).

Jara abono: 3,50 fr. (1,40 S).

Specimena numero kontraŭ respondkupono.

